

BELGA ESPERANTISTO

47a Jaro — N-ro 2a — Februaro 1955a

Fondita
en 1908a



Abonprezo:
Fr. 100,-

Redaktejo-Administrejo:
la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliganta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

La Festoj de nia Ora Jubileo en Antverpeno

...abaton, la 12-
de februaro,
...ne, vera neg-
mo regis en
Belgujo...tiel
kelkaj vetera-
devis rezigni
anoncitan vo-
an al Antver-
...Pli junaj
kiuj intencis
omobile vetu-
kaj estis di-
...jam survo-
devis rezigni
kaj telegrafi
kulpigon kaj
tulojn!

Kaj, - malgraŭ
la jubileaj
aj de nia Li-
en Antverpe-
akiris gran-
an sukceson.

La nombro de la partoprenintoj, ki-
kutime ĉeestas nacian kongreson,
nte el aliaj urboj ol Antverpeno,
almenaŭ tiel granda kiel dum tia
greso: tutaj karavanoj venis el
o kaj Bruselo kaj bonaj delega-
venis el aliaj lokoj: Gento, Mehle-



Post kiam S-ro H. Sielens (dekstre) prezentis la ĉeestantojn al la Urbestro
S-ro Craeybeckx (maldekstre) ĉiuj aŭskultas la paroladon de la Liga Prezidanto
S-ro Maur. Jaumotte (meze).

(Kliŝo „Gazet van Antwerpen“)

no, St. Niklaas Lieĝo, Verviers, Char-
leroi, Seraing, Namuro kaj aliaj regi-
onoj de la lando.

Aldonu ni la kompreneble escepte
fortan delegacion de la antverpenanoj
kaj ni povos imagi kiel, — jam sabate
vespere, — la salono antaŭvidita por
la kultura horo kaj por la balo, estis
efektive tro malgranda.

Sed ni preparolu la programon ekde
la komenco.

SABATE POSTTAGMEZE

Flordemetoj

Je la dua, sabaton, delegacio de Rega
Belga Ligo Esperantista, gvidata de S-roj
Maur. Jaumotte kaj Henri Sielens, prezidan-
to kaj ĝenerala sekretario, demetis florgar-
bon sur la tombon de la iama prezidanto
de la Ligo Frans Schoofs kaj salutis tie
S-inon Henriette Schoofs kaj S-ron Léon
Schoofs.

Je la tria, multaj aliĝintoj kunvenis apud
la Nacia Banko por, sekvantare, iri al la
Monumento al la Militmortintoj, kie eke-



Festkunsido de „La Verda Stelo“

Je la duono post la tria, okazis en la akceptejo kaj kunveno de „La Verda Stelo“, festkunsido de tiu ĉi grupo, honore de ĝiaj propraj jubileantoj.

S-ro Sielens, prezidanto de la Organiza Komitato, salutis la ĉeestantojn, kiujn li bonvenigis kaj poste S-ro Jaumotte, prezidanto de la Grupo, vokis la honorigotajn gemembrojn, kiuj akiris la medalon aŭ aldonan steleton pro fidela membreco kaj kies nomojn estos publikigitaj en nia proksima numero.

Vizito al la Internacia Marista Domo

Post aldono de kelkaj klarigoj pri la programo de la du tagoj, ĉiuj kune iris al la Internacia Marista Domo, kie S-ro Sielens direktoro, akceptis la vizitantojn kaj montris al ili la instalaĵojn de tiu ĉi palaco, oketaĝa domo, en kiu ne nur maristoj, kutimigintaj al iom kruda vivo, sed ĉiuj ajn facile alkultimiĝus, ankaŭ por longdaŭre restado. Tiu ĉi „Hejmo“ posedas efektive ne nur multajn belajn dormĉambrojn, kun plena komforto; ne nur restoracion kaj kafejon, sed salonojn kun diversaj ludoj kaj kun multnombraj logantaj brakseĝoj; ne nur gimnastikejon kaj longan, modernan keglejon, sed ankaŭ intiman bibliotekon kaj teatro-kinejon kun 270 veluraj seĝoj kaj kiu estas vera juvela salono.

Post la vizito, la eksterurbanoj ricevis la ŝlosilon de sia ĉambro, povis do refreŝigi kaj ĝui, en la agrabla restoracio, same bonan kiel malmultekostan vespermanĝon, por kiu ankaŭ multaj antverpenanoj kunsidis.

Kultura Horo kaj Balo

Jam antaŭ la oka, komenciĝis en „Witte Leeuw“, la disaŭdiga prezentado de ses-skeĉa teatraĵo de S-ro Maur. Jaumotte, pri la vivo de D-ro Zamenhof.

Sed antaŭe oni reaŭdigis la flandralingvan radio-paroladon, faritan la antaŭan merkredon de la Prezidanto de la Ligo, ĉe la antverpena Radio-Studio, pri la Ligo kaj la jubileaj festoj.

Al la prezentado de „La Turo de Babelo“ kunlaboris F-ino Hél. Hofkens (la parolantino), S-ino Paula Tytgat-De Ketelaere (la patrino de Z.), F-ino Mimi Ameryckx (la fianĉino de Z.), F-ino Elza Van der Weken (fratino de Z.) kaj Fr-o Gaston Verhoeven (Zamenhof, infano). S-ro Roger Jaumotte (Zamenhof, plenkreskulo), S-ro Adh. Verhoeven (Leo Belmont) kaj S-ro J. Verstraeten (Antoni Grabowski).

Aldonu ni al tiuj ĉi nomoj tiujn de S-ro Montmirail, kiu prizorgis la tutan ensceniĝon de tiu bela rememorigo pri la vivo de nia Majstro kaj S-inon Fél. Jaumotte-Meulemans, kiu, dum la disaŭdigo, sur la blanka tukio, projekciis multajn bildojn, kiuj rilatis al la scenoj prezentataj.

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.
Vicprezidanto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Generala Sekretario-Kasisto: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falconruil, 21, Antverpeno.
(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

Por permesi la enpresigon de la raporto pri niaj jubileaj festoj, ni prokrastas ĝis cetera baldaŭ aperonta numero la grupajn raportojn.

Ni el ili, nur elprenis la informon pri la elekto de nova komitato en la Brusela Grupo Esperantista, kiu nun estas jene kunmetita:

Prezidanto: S-ro Jacobs.
Vicprezidanto: S-ino M. Weyn.
Sekretario: S-ro Jirousek.
Helpsekretario: S-ro Nelis.
Kasisto: S-ro Schoemaker.
Gekomitatanoj: S-ino Elly Staes kaj S-ro Vander Stempel.

Varma estis la sukceso de reĝisoro kaj artistoj, kiujn la aŭtoro gratulis, dum S-ro Ameryckx aplaŭdigis tiun ĉi lastan.

Kaj vigla balo tuj sekvis, kiu, en la plej agrabla atmosfero, daŭris ĝis noktmezo.

LA DIMANĈA TAGO

La dimanĉa tago komenciĝis, por la katolikaj partoprenantoj, per Di-servo en la Sta. Juliina Kapelo de la Van Maerlantstraat, kie Abato Muller diris la Meson kaj bele predikis en nia lingvo.

Iom post la deka, ĉiuj kuniĝis sur la Granda Placo por la vizito al la Urbdomo kaj la akcepto fare de la Urbestro.

Akcepto en la Urbdomo

Dum kvaronhoro, S-ro Jaumotte rondiris la grandan grupon tra la plej gravaj kaj belaj salonoj de tiu ĉi malnova Urbdomo kaj kondukis ilin poste al la Leyssalono, kie baldaŭ aperis S-ro Craeybeckx, urbestro, al kiu estis prezentataj la membroj de la Organiza Komitato, la prezidantoj kaj delegitoj de amikaj Ligoj, la eksterlandaj samideanoj kaj la estraro de la Ligo.

Post prezenta vorto de S-ro Sielens, prezidanto de la O.K., la Ligo Prezidanto diris sian ĝojon ĉar, por la tioma fojo, liaj amikoj kaj li povas esti akceptataj en tiu ĉi urbdomo, ĉar ĉiujfoje, temas pri festaj okazajoj, inter kiuj tiu ĉi de la Ora Jubileo certe estas unu el la plej feliĉigaj.

Li ne volas fari al la urbestro la historion detalan de nia movado, ĉar li scias ke, se tiu ĉi ne estas efektiva esperantisto, li tamen estas esperantisto laŭkore, ĉar li mem jam en ĵurnaloj defendis Esperanton.

Kaj S-ro Craeybeckx, por montri ke li ne forlasis la ideojn iam defenditajn de li, faris

Sekvas do nur la programoj:

ANVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“

Vendredon, la 4an de marto: Parolado ĵurnalo: la 11an: Teatra Elsendajo: la 18an: Parolado de S-ro J. Verstraeten pri „Vitrofabrikado“; la 25an: Karabetvespero.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista

Dum la unua horo de ĉiu kunveno: Elementa kaj perfektiga kurso. Ankaŭ la malnovaj membroj ĉeestu tiun unuan horon. Dum la dua horo:

Lundon, la 1an de marto: Muzika vespero; la 8an: Parolata gazeto: la 15an: Legado de B.E.; la 22an: Kartludado: la 29an: Triopa interparolado kun posta raporto.

la plej eksterordinaran paroladon, kiun li iam aŭdis flanke de akceptanto en Urbdomo. Li faris al la ĉeestantoj longan belan parolon por Esperanto. Ĉion tion en tiu ĝaja humora kaj simpla maniero, kiu lin karakterizas kaj kiu tutspeciala trafis ĉiujn.

S-ro Sielens tradukis resume tiun paroladon kaj tiam estis alportata la ĉampanvino, kiun oni ektrinkis je la bonfarto de movado kaj ligo.

La solena Jubilea Kunsido

Tra la mallarĝaj stratetoj de la malnova urbo, la partoprenantoj direktis tiam siajn paŝojn al la Internacia Marista Domo, kie estis okazontaj la diversaj aranĝoj de tiu ĉi tago.

En la teatra salono eksidiĝis, ĉe la estrara tablo, sur la scenejo: S-ro Maur. Jaumotte, prezidanto de la Ligo kaj S-ro H. Sielens, prezidanto de la Organiza Komitato kaj kun ili D-ro P. Kempeneers, prezidanto de B.C.K.E., S-ro G. De Brouwere, prezidanto de Flandra Ligo Esperantista, D-ro T. Van Gindertaelen, speciala delegito de la nederlanda asocio L.E.E.N., S-roj J. Soyeur, vicprezidanto de la Ligo kaj M. De Ketelaere, vicprezidanto de la loka sekcio „La Verda Stelo“.

Post enkonduka kaj rebonveniga parolo de S-ro Sielens, ekstaris S-ro Jaumotte, kiu skizis la historion de nia Ligo, per la elekto de la nomoj de ĝiaj sinsekvintaj estraranoj.

La klarigis, jen grave kaj emociige, jen humorplene kaj ĉerĉe, la rolon de ĉiuj prezidantoj, vicprezidantoj, ĝeneralaj sekretarioj

Paŝo post Paŝo

La sukceso ĉe UNESKO en Montevideo, estas multe pli granda ol la parto el ni kuraĝis esperi. Oficialaj rilatoj nur tre malfacile estas movblaj kaj ni ŝuldas grandan estimon al la kapableco de D-ro I. Lapenna, kiu tiel energie kaj lerte defendis nian intereson.

La atako, komencita per la petskribo, kiu trovis subtenon de 16 milionoj da homoj, liveris al ni piedingon al la venko, kiun meritas la internacia lingvo la rilatoj inter la popoloj de la mondo. Denove, kaj ĉi tiun fojo en tre bona maniero, pruvis ke survoje al la venko, oni renkontas malamikecon, multecon kaj, eĉ pli bedaŭrinde indiferecon, kiu nur povas esti forpuŝata per bona antaŭpreparo, brila organizo, firma konvinko kaj eminenta talento. Ni, Esperantistoj, havas kaŭzon por kiu ni, sed ve se ni nur ĝojkrias kaj

ne aktive eluzas la ŝancojn nun akiritajn por ni.

U.E.A. nun akiris konsultan pozicion ĉe UNESKO. Tio nur havas praktikan valoron se ni zorgas ke UNESKO havos multajn kaŭzojn konsulti U.E.A.

Nia unua tasko estas ke la enhavo de la en Montevideo akceptita rezolucio, estu vaste diskonigata en la rondo, kiuj rilatas al edukado, instruado, scienco kaj kulturo. Ne sufiĉas ke la naciaj esperantistaj gazetarservoj diskonigos la novaĵon. Ĉiu, kiu legas fakajn aŭ aliajn ĵurnalojn, kiuj nuriel rilatas al la supremaciitaj temoj, devas atentigi la redakciojn pri la rezolucio kaj pri la morala devo helpe UNESKON en ĝia celado.

Ĉar UNESKO interesiĝas unufoje pri instruado de Esperanto en la lernejo, fariĝas tempo ke oni ebenigu la vojon al tia instruado en tiuj lan-

Rezolucio adoptita de la oka sesio de la ĝenerala konferenco de Unesko, Montevideo, 10an de decembro 1954

Programo por 1955 kaj 1956: IV - Kultura aktivecoj

L423: La Ĝenerala konferenco, post diskuto de l'Raporto de l'Ĝenerala direktoro pri la internacia peticio favore al Esperanto,

L4231: Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto en la internaciaj intelektaj kulturaĵoj kaj por la interproksimiĝo de la popoloj;

L4232: Konstatas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;

L4233: Notas, ke pluraj Statmembroj deklaris sin pretaj enkonduki aŭ disvolvi instruadon de Esperanto en siaj lernejoj unuagrada, duagrada aŭ superaj, kaj invitis tiujn Statmembrojn daŭre informi la Ĝeneralan direktoron pri la rezultoj atingitaj en tiu rilato;

L4234: Rajtigas la Ĝeneralan direktoron priatenti la eksperimentojn, kiujn prezentas la utiligo de Esperanto por la eduko, la scienco kaj la kulturo kaj kunlabori tiucele kun Universala Esperanto-Asocio en la rilatoj interesantaj ambaŭ organizaĵojn

La kasistoj de la Ligo kaj diris ĉies merita. Poste li honorigis ankaŭ la centon da diplomitaj profesoroj, inter kiuj ankoraŭ dekkvin estas nun membroj de la Ligo. La honoran tabulon de la cititaj estraranoj kaj profesoroj ni publikigos en la sekvanta numero de nia revuo.

La cito de diversaj konataj kaj altsatataj homoj estis okazo por varma aplaŭdo.

Post tiu honoriga parolado de la ligo prezidanto, parolis laŭvice D-ro P. Kempeneers, S-ro De Brouwere kaj D-ro Van Gindertaelen, nome de la komitato kaj ligoj, kiuj ili reprezentas. Ili alportis la fratan steleton kaj la plej korajn bondezirojn de la membraro.

Tiam, proksimume 75 nomoj estis vokataj al jubileantoj, inter kiuj 20 veteranoj, kiuj

esperantistiĝis antaŭ pli ol 40 jaroj kaj laŭvice ĉiuj cititoj venis sur la podiumon kaj S-ro Jaumotte pinglis sur ilian bruston la belan novan medalon de R.B.L.E.: arĝentan kun la litero V de „veterano“ kaj „venko“ por tiu speciala kategorio: bronzan por tiuj, kiuj restis fidelaj dum almenaŭ 25 kaj ĝis 39 jaroj.

Fine la prezidanto menciis ke, ĉar D-ro Kempeneers kaj li mem ricevis la oran medalon „pro merito“, ŝajnas dezirinde, ke ankaŭ aliaj meritplenaj membroj ricevu medalon „pro merito“.

Se li tamen povis kompulsi kaj kontroli listojn, en kiuj temis nur pri jaroj de membreco, li ne deziris, nek deziras, sola aŭ kun la nuraj estraranoj, decidi pri la disdono de medaloj „pro merito“. Li do, — ekkomen-

doj, kie la leĝo ĝis nun malfaciligis ĝin. En Nederlando ekzemple la instruado de fremdaj lingvoj en elementaj lernejoj povas okazi nur en la malmultaj t.n. liberaj horoj aŭ ekster la oficiala lerneja horaro.

Antaŭ kelkaj jaroj, propono pri ŝanĝo de la leĝo pri instruado favore al Esperanto estis malakceptata per malgranda plimulto. Nun estas tempo denove tuŝi ĉi tiun temon kaj peti novan pritrakton. Sufiĉe multaj el la tiamaj kontraŭvoĉdonantoj ne estis kontraŭ Esperanto, sed ne ŝatis doni privilegion al Esperanto super aliaj fremdaj lingvoj. La decido de UNESKO certe estas kaŭzo por revizio de la antaŭa starpunkto.

Ĉiu el ni pripensu, kion li povas fari ĉe redakcioj, ĉe organizaĵoj, ĉe gepatraj lernejoj komisionoj kaj ĉe individuaj personoj. Se oni havas bonajn rilatojn, sed mem ne bone kuraĝas defendi nian celadon, oni petu la helpon de iu, kiu sentas sin pli bone informita pri la afero.

La venko ĉe UNESKO estas nur paŝo, sed paŝo kiu ebligas multajn aliajn paŝojn, eĉ marŝon, se ni nun ĉiuj agas kaj marteladas.

H.J.B.

cige —, elektis kvin nun ankoraŭ ĉiam laborantojn en la movado, pri kiuj neniu dubo povas ekzisti; kiujn cetera ĉiuj, ankaŭ la novuloj, konas kaj kiuj formas do la kontrolkomisionon, kiu esploras la proponojn, kiujn faras la administrantoj de la Ligo.

Al tiuj kvin personoj, li transdonis la medalon pro merito. Tiuj ĉi estas: S-ino Julia Plyson, kiu ĵus finis mandaton de pli ol kvin jaroj de zorga, ligo, kasista laboro.

S-ro Clotaire Vandeveld, dum diversaj jaroj ĝenerala sekretario de la Ligo kaj nun ankoraŭ la gvidanto de la Genta Grupo;

S-ro Charles Poupeye, iama sekretario de la Ligo kaj, de multaj jaroj jam, la vigla prezidanto de la Bruga Grupo;

S-ro Morris De Ketelaere, iama ĉefdelegito de U.E.A. kaj, de pli ol tridek jaroj kaj ĝis nun, senlaca profesoro pri simpla kaj pri profesora ekonomio de nia lingvo;

kaj S-ro Georges Vanden Bossche, la vera gvidanto fidela de „Belga Esperanto-Instituto“.

La Prezidanto esprimis la deziron ke, se laŭ iu administranto de la Ligo, iuj aliaj estas honorigotaj „pro merito“, ankoraŭ dum tiu ĉi jubilea jaro, li skribu al li sian proponon kun detaloj, tiel ke la transdono de la medalo povu eventuale okazi dum la jubilea kongreso en Utrecht, post esploro

kaj favora decido de tiu ĉi komisiono kaj de la administrantaro.

Fine parolis S-ro Morris De Ketelaere, kiu esperantistigis en tiu sama jaro 1917, kiel la liga prezidanto, kiu dum pli ol tri dekkvin jaroj estas lia bona amiko kaj kunlaboranto en „La Verda Stelo“, kies vicprezidanto la parolanto cetere estas.

Li volis honorigi la nuran, pri kiu ne parolis la Liga Prezidanto kaj memorigis tiam pri la escepte ampleksa kariero de tiu ĉi jubileanto, same sur la loka kiel sur la nacia kampo, sur kiuj ambaŭ li plenumis la plej diversajn... kaj fakte ĉiujn estrarajn taskojn.

Nome de S-ino Schoofs, ankaŭ esperantistino el tiu sama jaro 1917, kaj de li mem, kiel ankaŭ en la nomo de ĉiuj esperantistoj, li varmege gratulis sian amikon. Kaj ambaŭ enbrakiĝis, meze de la longaj aplaŭdoj de la ĉeestantaro.

Tiel finiĝis tiu ĉi simpla sed bela solenaĵo pri kiu multaj ankoraŭ longtempe memoros.

La Festeno

Kaj post kvin minutoj, ĉiuj kunsidis ĉirkaŭ bele aranĝitaj tabloj en vasta lumplena restoracio... Cent kaj dek festmanĝontoj.

Ĉe la honora tablo, kiun prezidis S-ro Jaumotte, sidis: desktren: S-ino P. Kempeneers, S-ro H. Sielens, S-ino M. Jaumotte, S-ro J. Soyeur, S-ino Plyson, S-ro M. De Ketelaere, F-ino Cl. Peeters kaj S-ro J. Verstraeten, sekretario de la O.K.; kaj maldekstren: S-ino M. Sielens, D-ro P. Kempeneers, S-ino H. Schoofs, S-ro kaj S-ino G. De Brouwere, D-ro Van Gindertaelen, S-ino kaj S-ro R. Balleux, kasisto de la O.K.

Bele presita menuo atentigis pri la jenaj pladoj:

Asparaga Kremsupo

Normanda Soleo

*Rostita Kokino
kun legomoj
kaj kompoto
Terpomaj
fritajetoj*

Fruktosalato

Kafo

kaj ĉiuj, kiuj partoprenis, povas atesti ke ĉio bonege gustumis kaj ke estis unu el niaj plej bonaj festmanĝoj.

Je la toasta horo, oni aŭdis S-ron M. Jaumotte, kiu, nome de ĉiuj, dankis la O.K.: la sekretario S-ron Verstraeten; la kasiston, S-ron Balleux kaj ĉiujn kunlaborintojn senescepte, kiuj bonvolis helpi la prezidanton S-ron H. Sielens, al kiu li direktis duoblan komplementon, ankaŭ ĉar li, kiel direktoro de la Hejmo, tiom multajn aferojn tiel bone aranĝis kaj al kies edzino li transdonis belan florgarbon.

Tiam parolis laŭvice D-ro Kempeneers kaj S-ro Ch. Poupeye, kiuj alportis la varman dankon al la Liga Prezidanto kaj al liaj helpantoj, nome de la brusela kaj bruga grupoj kaj kiuj transdonis de S-ino M. Weyn kaj de F-ino Van Parijs belajn florojn al S-ino Jaumotte.

Kaj finis la serion de la toastoj S-ro Verstraeten, kiu, post sprita paroladeto, levis sian glason al la sinjorinoj, dum garbo estis transdonata ankaŭ al S-ino Kempeneers: dum plia florgarbo estis destinita al S-ino Schoofs, kiu, dum la festenmanĝo, estis forvokita pro subita morto, sekve al apopleksio, de S-ro Theo Schoofs, frato de Frans Schoofs.

La prezidanto speciale salutis dum la manĝo la Abaton Muller, kiu venis de St. Vith kaj faris la predikon en esperanto, kaj la francajn samideanojn el la pariza regiono Asnières, nome de kiuj respondis S-ro R. Watier, prezidanto de la grupo de Nanterre. Li ankaŭ legis telegramojn, leterojn kaj kartojn de S-ro Philippe, prezidanto de NEF, Arras (Francujo); de la Federacio de Laboristoj Esperantistaj; de S-ro Somers, sekretario de TANEF; de S-ro Lodema (Amsterdam), de G-roj J. Jacobs kaj hispanaj amikoj: de S-inoj F. kaj E. Staes; de G-roj Stroobandt, de S-ro Adv. M. Roost, de S-ro Desonay kaj aliaj.

Kabareta parto

Dum la lasta parto de la festeno, okazis kabareta parto, al kiu partoprenis, S-roj Peelman kaj K. Ameryckx, kantistoj; F-ino Hél. Hofkens kun skeĉo pri nazoj; S-ro C. Tytgat, flutisto, kaj F-ino Cl. Peeters, pianakompanantino. Ĉiuj akiris varmajn aplaŭdojn.

La Ekspozicio

Je la fino, okazis vizito al ampleksa ekspozicio pri la 50-jara vivo de la Ligo: Dek grandaj kvadratmetraj paneloj kaj kvin longaj tabloj permesis admiri centojn da dokumentojn, fotografiajn kaj presitaĵojn, ekde la jaro 1902 kaj ĝis la plej apuda tempo. La dek paneloj pritraktis speciale la estradon dum la unua duonjarcento: malnovajn grupajn dokumentojn; la naciajn kongresojn; la 7an kaj la 20an universalajn kongresojn; la diplomitajn profesorojn la festenojn de R.B. L.E.: Belgan Esperanto-Instituton kaj la festojn en „La Verda Stelo“.

S-ino M. Jaumotte, F-ino Brack kaj S-roj R. Jaumotte, Verstraeten kaj Verhoeven, la aranĝintoj de tiu ekspozicio, meritas verajn laŭdojn por tiu ĉi grava kaj bela laboro.

En la teatro-kinejo

Post tiu ĉi vizito, ĉiuj retroviĝis en la intima teatra salono, kie S-ro R. Van Eynde montris la filmon pri Aŭstralujo, „esperante parolata“.

Repagu vian kotizon

Ni atentigas pri la fakto ke tiu ĉi numero estas la lasta, kiun ni sendos al la aboninto de pasinta jaro, kiuj ne jam repagis sian kotizon por 1955a.

Tiu ĉi povas esti pagata al la Grupaj kassistoj kaj, por la izoluloj, al la Liga pokasistoj.

DE ESPERANTIST & L'ESSOR DE L'ESPERANTO

Belga Esperanto-Instituto atentigas pri la fakto, ke ĝi organizas la disvastigon de tiu ĉi bonegaj propagandiloj en nia lando.

Ĝi povas liveri apartajn abonojn je 7 — „DE ESPERANTIST“ kaj Fr. 15 — por „L'ESSOR DE L'ESPERANTO“.

Tiuj prezoj estas minimumaj kaj subtenabonaj je iom plialtigita prezo estas bonvenaj.

Por minimuma kvanto de 10 ekz. de unu numero, ĝi kalkulos Fr. 1,50 por ĉiu ekzemplero.

Direktu vin al „Belga Esperanto-Instituto“, Oostenstraat 26 Antverpeno. (PĈK. 16.89.58).

Dum preskaŭ duonhoru, la plej belaj vortoj el tiu vasta lando, granda kiel Usono, estis montrataj kaj en esperanto pritraktataj.

Kaj fine, la posttagmezo konkludiĝis per la prezento de la unuakta teatraĵo de Roge Avermaete, en traduko de S-ro M. Jaumotte „La Bona Hejmo“, tiu karcerulo kun ankoro nur unu malliberulo kaj kiun subite vizita nova inspektoro, alportante en ĝin per urbon kaj konfuzon.

F-ino Cl. Peeters, kiel la gardistedzinino kaj S-roj K. Ameryckx, la gardisto: P. Peelman, la inspektoro, kaj Fr. Schellekens, la ununura malliberulo, dum plena horo, amuzis la publikon, per siaj vere sprite diritaj humorajoj.

S-ro M. Jaumotte tiam suriris la scenon por transdoni. — kun freŝaj floroj al F-ino Peeters, — ankaŭ sian gratulan dankon al la tri viraj kunludintoj kaj al la aliaj kunlaborintoj sur, malantaŭ kaj sub la senecejo: S-ino M. Sielens, S-roj Verstraeten kaj R. Jaumotte, kiu lasta, dum la du tagoj, ankaŭ funkciis kiel gazetara sekretario de la O.K.

Kaj dua rea aplaŭdo longe rekompencas la geaktorojn.

La Liga Prezidanto fine aldonis lastas vorton entuziasmigan antaŭ la disigo.

Sed multaj inter la partoprenintoj ankoraŭ, dum unu aŭ kelkaj horoj, gaje kunsidis en la kafeja salono de la Hejmo... tiu alia „Bona Hejmo“, en kiu la esperantistaro sentis sin kune... kiel la fidela ŝipanaro de la granda, bela ŝipo de la Esperantoj.

L. P.

Bibliografio

LA INTERNACIA LINGVO, Faktoj pri Esperanto, de D-ro Ivo Lapenna: Universala Esperanto Asocio (C.E.O.), Londono, 1954 p. 192, Havebla via Libro-servo aŭ Instituto.

Por la kandidatigo de UEA al la Paco-premio de la Norvega Nobel-Komitato necesis kolektado de ĉiuj faktoj pri nia internacia Organizaĵo: dro Ivo Lapenna ricevis tiun komision kaj kunigis tiom abundan kaj valoran dokumentaron ke la UEA-Estraro decidis aperigi ĝin en libroformo. Pluraj aldonaj partoj estis verkitaj ne nur de dro Lapenna, sed ankaŭ de kelkaj kunlaborantoj aŭ surbaze de iliaj informoj (R. Rosetti, W. Auld, H. Jakob, W. Solzbacher, H. Steiner), tiel ke estiĝis la libro nun recenzata.

La verko estas dividita en tri partoj: 1. Esperanto kiel solvo de la problemo de internacia lingvo; 2. Esperanto-Organizaĵoj, celoj kaj laboroj; 3. UEA.

La unua parto donas informojn pri la formigo, ekesto kaj evoluo de Esperanto, represas kelkajn menciindajn opiniojn pri ĝia valoro kaj signifo, resumas aspektojn pri ĝia instruado, klarigas pri la Esperanta Literaturo (originala kaj traduka), pri la scienca, faka kaj popularscienca Literaturo, pri la fakaj vortaroj kaj terminaroj, pri la Gazetaro kaj aldonas disvolvon pri diversaj formoj de praktika aplikado de la Internacia Lingvo kaj finigas per la Historio kaj celo de la Internacia E-Muzeo en Wien.

La dua parto skizas, en kelkaj malmultaj paĝoj, la liston de la organizaĵoj unuflanke por la disvastigo de E. kaj aliflanke por ĝia praktika utiligo.

La tria parto detale rakontas pri UEA: ĝia historio, la nuna organiza formo, ĝia kultura agado, ĝiaj praktikaj servoj kaj diversaj aktivecoj por interfratigo de la Popoloj.

Konkludo, Bibliografio kaj Dokumentoj, indekso estas la lastaj partetoj de la impona tuto.

Estas evidente ke tia verko estis necesa kaj restos utila por la Esperantistaro, ne nur ĉar ĝi estas ĝisdata, sed ankaŭ ĉar ĝi estas vere kompleta kaj lingve modela.

Sajnas al mi ke „ĝi prezentas en plej konciza maniero almenaŭ la ĉefajn rezultojn atingitajn en la Internacia Lingvo kaj pere de ĝi en ĝia 66-jara ekzistado“ kaj krome ke ĝi donas en la manojn de la Esperantistaro novan batalilon en formo de taŭge ordigitaj faktoj“ (Enkondukaj Vortoj de I.L.)

Kiel dro Lapenna diras mem, tiaĵo estis la ĉefaj celoj de la eldonaĵo kaj oni havas la konvinkon ke li plene atingis ilin.

La eksterajo, la preso kaj la pre-

zento de la libro estas bonegaj tiel ke sendube ĉiu Esperantisto, ne nur la „eterna batalanto“ sed ankaŭ la „eterna komencanto“ deziros vidi ĝin en sia biblioteko: ni sincere esperas ke ambaŭ krome ofte uzos ĝin, — ĉar ĝia valoro estas apenaŭ taksebla. — por realigi Idealon, pri kies beleco kaj praktikaj ecoj, nur stultuloj dubas.

WÖRTERBUCH DEUTSCH-ESPERANTO, de Hans Wingen: eldonejo de Limburger Vereinsdruckerei.

La vortaro delonge atendita fine ekzistas. Ofte ni sentis la mankon de german-esperanta vortaro en la postmilitaj jaroj, kiam ne plu estis haveblaj Bennemann, nek Christaller nek al tre utila Liliputvortaro „10.000 Worte“. Nu, la Wingen vortaro certe ne estas liliputa, ĝi enhavas ĉ. 25.000 gvidvortojn kaj ampleksas 177 paĝojn. Tamen oni tuj konstato ke ĝi estas malpli granda ol la standarda vortaro de la antaŭmilita tempo, tiu de Bennemann, kiu havis 450 paĝojn (kun iom malpli granda kompostformato). Komprenble tio nun prezentas la avantaĝon, ke la Wingen vortaro havas ankoraŭ tolereblan prezon, kaj tio verŝajne estas la kaŭzo de la malgrandigo. Se la prezo ne ludus rolon, oni ja plej bone represus la Bennemannvortaron farante la necesajn aldonojn por novaj vortoj kaj la forstrekojn kaj ŝanĝojn, kiujn necesigas la moderna lingvovolvuo.

Se oni volas kritiki vortaron oni devas kompari ĝin, kaj tion mi faris. Mi prenis paĝon 218 de Bennemann (aperinta en 1926) kaj notis, kio estis alia. En Wingen mankis jenaj vortoj Mastix, Mastodon, Masturbation, Masure, Matinee, Maturität, Mätzchen, Matze, Maurerkelle, Maueranschlag, -pfeffer, -kronezinne, mausig, Mäusebussard, Mausoleum, Maut, maximal, Mayonnaise, Mazedonien, Mazurka, Media. El tiuj, pluraj estas internaciaj vortoj facile esperantigeblaj eĉ por komencanto, sed jam pli malagrable estas la manko de Maturität (en Svislando ekzemple tiu vorto estas sole uzata kaj neniam Abitur), Maurerkelle, Mayonnaise (la esperantigo „majonezo“ ne estas memkomprenebla kaj kiel sciuj serĉanto, kiu ne posedas P.V. ĉu ĝi estas permesebla?). Bennemann enhavas ankaŭ tre multajn parolturnojn kiel Maulaffen feil halten, ein gutes Maul haben, jemandem das Maul stopfen, jemandem ums Maul gehen. Tiaj esprimoj mankas tute ĉe Wingen, aliel li ne estus povinta tiagrade redukti la amplekson de sia vortaro. Aliflanke li donas kelkajn vortojn, kiuj mankas ĉe Ben-

nemann nome Matthias, mäuschenstill kaj meckern en la senco de grumbli aŭ kritikaĉi. Unu vorto estas malĝusta ĉe Bennemann, nome por Mastkorb „marso“ (ne ekzistas), Wingen korekte uzas „topo“. Alie mi trovis kelkajn kritikindaĵojn. Kial li mencias ĉe la vorto Matrose nur „ŝipano“ kaj ne „maristo“, kiu ŝajnas al ni pli ofta ol la unua. Kial li enkondukas la maltaŭgan vorton „amajistino“ por Mätresse, kial li mencias por matschig nur „kota“? Ĉu oni povas diri „kota piro“ por „matschig Birne“? „Matte“ ne estas nur „monta herbejo“, sed ĉiu herbejo.

Kion provas ĉi tiu analizo de unu paĝo? Ĝi montras, ke Wingen devis tute rezigni pri la strebado al certagrade kompleteco, efektive li nur faris poŝvortaron — kaj oni ankaŭ povas tre bone preni lian vortaron en la poŝon, kio ankaŭ estas avantaĝo. Ĝi montris kritikindaĵojn, sed ne gravajn erarojn. Ĝi montras nemstarecon de la aŭtoro. Koncerne la lastan punkton certaj aliaj paĝoj estus provokintaj ankoraŭ pli favoran juĝon, ĉar la aŭtoro tre klopodis adapti sin laŭ la aktuala lingvouzo kaj de la germana kaj de la esperanta lingvoj.

La rimarkinda romanĉa vortaristo Ramun Vieli iam ekĝemis dirante: „Kiun dio volas puni, tiun li igas verki vortaron“. La laboro estas klopodiga kaj poste la kritikistoj pendigas la aŭtoron ĉe radikoj kaj silaboj. Ni ne volas fini sen esprimi al Hans Wingen la dankon en la nomo de la tuta germanlingva esperantistaro, ke li plenumis tiun tre necesan kaj utilan laboron kaj prezentis al ni verkaĵon, kiu enhavas la maksimumon, kiun la spaco permesis.

A. Baur

JARLIBRO de U.E.A. 1954, Dua Parto kun Matematika Terminaro, kaj kun resuma raporto de la progresoj de Esperanto dum la pasinta jaro. Liverata nur al Individuaj Membroj de U.E.A.

En sia kutima formo kaj klara prezo ĝi prezentas al la membroj la utilajn informojn pri la Kotizoj 1955, la membrostadistikon 1953, la kontojn UEA 1953, la financon raporton 1953 pri la Akademio, la estraran raporton 1953-1954, la CED-raporton, la raportojn de Landaj Asocioj, k.t.p.

En siaj paĝoj 39-77 ĝi enhavas Matematikan Terminaron, de C. M. Bean, B.Sc., Ph. D., F.R.I.C. kun enkonduko kaj klarigo kaj listo de mallongigoj. Estas evidente ke por specialistoj kaj krome por ĉiuj Esperantistoj, kiuj ja foje bezonas kelkajn teknikajn terminojn matematikajn, ĉi tiu verketo estos tre utila kaj nepre uzota, ĉar tute freŝdata.

HIMNARO ESPERANTA, kompilita de Montagu C. Butler, kvara eldono de „Fellowship of British Christian Esperantists, Londono, 1954, p. 161.

Ĉi tiu nova eldono enhavas 236 himnojn (en 1907: 26; en 1910: 104; en 1921: 212) kaj estas destinita por ĉiu kristano.

Al ni la elekto de la himnoj ŝajnas tute laŭdinda, kiam krome la lingvo (iam estas originalaĵoj) impresas bonega kaj ofte kvazaŭ perfekta. Kompost, preso kaj bindo estas senproĉaj.

WIR LERNEN ESPERANTO, DIE WELTHILFSSPRACHE, Wilhelm und Hans Wingen: eldonejo de Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, 72 paĝoj prezo Fr. sv. 2.40.

Ĉi tiu lernolibro, kiu jam aperis en la kvara eldono, estas la plej ŝatata en germana lingvo, flanke de la instruistoj kaj flanke de la lernantoj. La gramatika materialo estas tre lerte prezentita, ĝi estas klara laŭ metoda vidpunkto kaj same laŭ tipografia prezento. La ekzercaĵoj germanaj-esperantaj estas tre laŭcelaj, dum la esperantaj tekstoj povus esti iom pli amuzaj. La lernendaĵo estas partigita en dekdu lecionoj; tio estas tre praktika, ĉar la plej multaj kursoj daŭras tri monatojn. Por progresuloj ekzistas de la samaj aŭtoroj alia tre praktika libro, kiu havas la titolon „Post la kurso”. En Svislando la Wingenlerilo estis utiligata en la lasta vintro en la kursoj de Bern kaj Winterthur. H.B.

Tra Loetschberg-Simplon al Bolonjo

Por veturi al la Universala Kongreso de Esperanto en Bolonjo ĉiuj nordanoj devas trairi la alpojn. Kiun vojon ili elektu? Tiun demandon klare respondas la prospekta, libreto, kiun ĵus eldonis la svisa fervoja societo Bern-Loetschberg-Simplon. Tiu linio, sur kiu veturas multaj internaciaj trajnoj, ne nur estas tre rapida, sed ĝi estas la plej bela, kiun oni povas imagi. Ĝi kondukas rekte tra la majestaj montoj de la Berna Oberlando al la suna kanton Valezo, kiun la vojaĝanto povas admiru veturante sur alta teraso, kiu nur malrapide malsupreniĝas al Brigo. De tie la longa Simplontunelo formas la pordon al ĉarma Italujo. La nove eldonita prospekto klarigas ĉion ĉi en bela Esperanto kaj kompletigas la tekston per dekunu paĝoj multkolore ilustritaj. Tiuj vidigas la panoramon, kiun la vojaĝanto persone povos admiru, dum lin portas la radoj al la Universala Kongreso. Postulu la prospekton ĉe la INFORMSERVO DE BLS, GENFERGASSE 11, BERN, Svislando. Vi havigos al vi belegan libron, kiun vi ĉiam volonte rigardos.

KRONIKO DE LA HISTORIO

Primitivaj Religioj

Sciencaj kaj pseudo-sciencaj medioj ofte disputas pri la problemoj de la deveno de la homspeco. Kiu ajn estu la starpunkto aŭ la konvinko, unu fakto estas jare tute certa, nome ke ankaŭ la plej primitiva homo klare distingiĝas de la bestospeco pro tri tipe homaj ecoj: la teknika progreso, la arto kaj la religio.

La religio de la prahistoria homo kaj tiuj de la konataj primitivaj popoloj (primitivaj ĉar je la komenco de la civilizigo ĉu Germanaj, ĉu Egiptaj, ĉu Grekaj aŭ Romanaj) havas karaktertrajtojn kiuj estas esence la samaj.

1) La dio(j). Ili ĉiuj adoras naturfortojn aŭ fenomenojn ekz. la sunon, la fulmon, la tondron, la terfekundecan, la lunon. Sed ili personigas tiujn fortojn. Ili imagas personajn diojn kiuj estras tiujn fortojn. Evidente la nomoj estas malsamaj. Ke tiu popolo havas multe pli da dioj ol tiu alia, ne estas esence. Estas tute kompreneble ke la prahomo, fremda en tiu-ĉi mondo ĉar ne konante ĝin nek ĝiajn leĝojn, adoras fenomenojn kiujn li konstata, kies povon li kun timo admiras kaj kies sciencan klarigon li ne ankoraŭ scias. Plie, li homigas tiujn diajn personojn; li donas al ili la homan karakteron kun gajeco, kolerigo, amo kaj malamo ktp. ktp. Ili kredas ankaŭ ke tiuj dioj miksiĝas en la homa vivo, foje por helpi sed ankaŭ ofte por malhelpi la homojn. Generale kiam iu dio emas helpi, kelkaj aliaj, jaluziigintaj, tuj malhelpas, sed tiuj dioj faras ĉion multe pli amplekse kaj kun multe pli da forto ol la homoj. La en multaj naciaj lingvoj konata esprimo de la „neestingebla rido” estas la rido de la Grekaj dioj kiel ilin priskribas Homeros. Kiam la Grekoj iras

(Komenco kol. 1)

Ankaŭ la GERMANA Federacia Fervojo eldonis novan prospekton en Esperanto, jam la dua en mallonga tempo. Ĝi konsistas el dekdu kunfalditaj paĝoj, kiuj kune montras sur unu flanko karton de okcidenta Germanujo kaj sur la alia flanko diversajn turismajn kaj transportajn allogaĵojn. Eldonis: Werbeamtb der Deutschen Bundesbahn, adreso ne indikita.

ROZOJ KAJ URTIKOJ de Paul Thorsen. Poemaro parte tradukoj, parte originalaj; eld. Komuna konversacia Klubo; Randbølvej, 4, Kopenhago F. (Danl.) 1954 — p. 117 — Prezo 10,5 d.Kr. Recenzota.

ANTOLOGIO DE BRAZILAJ RAKONTOJ, 35 aŭtoroj.

33 rakontoj: 33 tradukoj, eld. Braz. E. Ligo, 1954 p. 283.

ataki la urbon Trojo, en iu momento Apolo koleriĝas je ili kaj en furiozo li malsuprenvenas el la ĉielo kaj pafas al la Grekaj soldataroj (nur) unusagon. Sed tiu unusago sufiĉas por ekstermi dek mil soldatojn.

2) La postmorta vivo. Ĉiuj primitivaj kaj prapopoloj kredas ke venos vivo post la morto. Ili imagas tiun postmortan vivon kiel la vivon sur tero. La animo revenos en la korpo, la mortinto rebezonos kaj reuzos la ĉiutagajn hejmajn kaj aliajn aĵojn, kaj se, por feliĉo, la lasta juĝo estos por li favora, li ne plu konos malsanojn, unuvorte neniu el la teraj mizerajoj. Tiam li venos en la ĉielo. Ankoraufoje la Egiptaj kampoj de „Ea-ru”, la Grekaj „Elizeaj kampoj” aŭ la Germana Valhalo estas esence la samaj. Tie la homoj devos fari nur la surtero ŝategatajn okupojn: ĉasi kaj poste ripozi kaj trinki. En la priskribo de la ĉiela vivo ĉiuj estas tre limigitaj. Sed kia grandioza fantazio en la priskribo de la infero(j). Dante Alighieri (ne primitivulo!) konis nur sep stadiojn (cetere inspiritajn de la Ptolemaja astrosistemo). Kontraŭe la vasta kaj belega templo de Angkor (en Kambodĝo) ŝajne montras en skulptoverko ne malpli ol 32 inferojn. Kiujn terajn suferojn la antikvaj Grekoj ja elpensis! Tiu de la senfina soifego (Tantalo-turmento), de la eterna timo, de la senfina korpa penego (la barelo de la Danaidoj), ktp. ktp. La surtero konitajn suferojn ili transigas en la postmorta vivo.

Kelkaj popoloj speciale akcentis ke la mortintoj ankoraŭ partoprenas la hejman vivon, almenaŭ ilia spirito. De tie la speciala ĉambreto aŭ ĉambroangulo kun la hejmaltero ĉe la primitivaj Romanoj, kie ili metas iom de la nutraĵoj antaŭ ol mem manĝi.

Generale estas ankaŭ disvastigita la kredo ke la korpo devas esti konservata por ke la animo povu reeniri ĝin: absoluta kondiĉo por plua vivo. Tio klarigas la prilaboron de la mortinta korpo (mumio) kiu estas senegala ĉe la Egiptoj. Kiel oni scias, oni entombigas multajn aĵojn, precipe armilojn kun la kadavro. Estas konate ke la famegaj piramidoj entenas nekalkuleblajn trezorojn. En kontraŭstaro kun tiu fakto ŝajnas la forbruligo de la kadavro, kiu dum kelkaj tempoj en la prahistorio okazis. Ni memorigu tamen ke samtempe la bezonaĵoj estis forbruligataj.

Povas esti ke tiuj homoj kredis ke la animo eniras en alia korpo. Ĉar jen, ne malmultaj primitivaj triboj kredas ke ankaŭ en ekz. bestoj vivas animo de estintaj homoj. Multe mal-

(Legu plu p. 14)

PRIMITIVAJ RELIGIOJ

(komenco p. 14)

pli konate sed tiom pli kortuŝa estas la zorgo de la malriĉulo en antikva Egiptujo, kiu per ŝparita mono acetas malmultekostan balzamon kaj aliajn necesajojn, kiu enkudras la kadavron en leda sako kaj nokte forportas ĝin malproksimen en la montaro kia li sekrete ie fosis tombon, kaj poste malaperigas ĉiujn postsignojn de lia pia laboro. La entombigo estis tiel nepre de la antikvaj Grekoj ke la animo de la neentombigito devis senripoze ĉirkaŭvagadi ĝis entombigo. Tiu kredo naskis unu el la plej famaj antikvaj dramoj: „Antigone”.

3) La simbolismo kaj la sorĉarto. Tiu-ĉi ĉapitro estas tro longa por ĉiur resumo pritrakti ĝin. La simboloj abundas en absolute ĉiuj (ne nur primitivaj) religioj. Tre multaj detaloj kiujn ni ne komprenas aŭ malfacile, estas simboloj. Kiam, laŭ la antikvaj Grekoj, la mortinto eniras la submondon (= Hades), granda hundo kun tri kapoj (= Cerbero) ja lasas lin eniri, sed neniam permesas ke iu ajn reirfu; tiam temas pri la morto en kiu ĉiu venas sed el kiu ankoraŭ neniu revenas. Rilate la sorĉarton, ĉiuj jam aŭdis pri ceremonioj por forĉasi malbonan spiriton. La mortintoj en Egiptujo ricevis mortolibron kiu entenis ne malpli ol 180 ĉapitrojn, kaj en kiu troviĝis la sorĉformuloj por protekti sin kontraŭ malamikoj dum la longa, penplena mortvojaĝo; por materiigi la sur la muroj de la tombo pentritaj nutraĵoj ktp. ktp.

4) La Formalismo. Ankaŭ pri tiu aspekto ni ne rajtas diri ke ĝi estas ligita sole al la primitivaj religioj. En la antikva tempo ekzistis popoloj kies religio postulis bonan konduton, bonan moralon. Ekz. en Egiptujo la junularo ricevis lecionojn laŭ sufiĉe ampleksaj moralkodoj. La Hebrea popolo estis devigata al morala sinteno. Psalmo 24, versoj 3-5 tekstas: Kiu supreniros sur la monton de la Eternulo? - Kaj kiu staros ĉe Lia Sankta loko? - Tiu kiu havas purajn manojn kaj senmakulan koron, - Kiu ne fordonis sian animon al malvero - Kaj ne luras trompe - Li ricevos benon de la Eternulo, - Kaj bonfarojn de Dio, lia Savanto.

Sed ekzistis popoloj ĉe kiuj ni tiel maloftege trovas moralan preskribon ke ni povas konkludi ke ilia religio konsistas nur el kelkaj eksteraj agoj kiel preĝformuloj kaj oferaĵoj (despli kruelaj ju pli la popolo estis diboĉa; ekz. la oferaĵo de vivantaj homoj en antikva Kartago). Cetere la oferoj havas ofte la signifon de kompenco pro konduto kiu eble ne plaĉis al la dio. La ritoj sufiĉis kaj estis ĉio. An-

kaŭ la kredo de kelkaj popoloj pri sia de dio superlektiteco faris ilin obeantaj al moralaj reguloj en la sino de la propra popolo sed tute sen moralo en konduto je aliaj. Sed kiam ni atentis pri la vivmaniero de multegaj nuntempaj kredantoj, oni emas kredi ke ankaŭ ilia propra religio estas nur formalaja.

Je la fino de tiu-ĉi skizo staras la fakto ke la homo, depost la komenco de lia ekzisto, kredas je forto(j) reganta(j) la universon, je postmorta vivo kaj je moralaj leĝoj obeendaj kontraŭ ĉiuj aspiroj aŭ materiaj interesoj.

Drs. Fernand Roose

La Germana Esperanto-Kongreso

okazos ĉi-jare je pentekosto en Neustadt, la centro de la fama vinregiono en Pfalz „Weinstrasse”. Tie ekzistas juna sed energia Esperanto-grupo, kiu nuntempe okazigas kurson kun 46 junuloj lernantaj Esperanton. Ili serĉas korespondanton Interesuloj pri la kongreso aŭ pri la korespondado anoncu sin ĉe Esperantogrupo Progreso, Neustadt an der Weinstrasse, Germanujo.

Internacia Junularkunveno en Baden-Baden

La lastan semajnon de 1954, la eleganta feriloko Baden-Baden gastigis proksimume dudek kvin esperantistojn — plej parte edukistojn — en la nove malfermita Germana Esperanto-Hejmo, kiun prizorgas tiel afable Sino Agnes Miller.

S-ro Michel Schmidt, de Konstanz, majstre aranĝis tiun renkontigon malavare subvencianta de la germanaj edukaj Aŭtoritatoj kaj prezentis aparte riĉan programon: Prof. Edmond Privat parolis ĉefe pri nacia sento, interpopola konduto kaj pri diversaj federalaj sistemoj; Rektoro Prof. G. Canuto traktis la junulkriminalecon kaj junulprizorgadon. Aŭdiĝis ankaŭ prelegoj de S-roj Hans Jakob, UEA-Estrarano (signifo de nia movado por eŭropa pensado), H. Wingen (subnormalaj lernejoj en Germanujo), M.

Schmidt (problemoj de fuĝinto-junularo, — kun vizito korporema al fuĝinto-restadejo en apuda arbaro). Viglaj diskutoj, interŝanĝo de ideoj kaj filmoj ilustris tiujn temojn interrompita de kelkaj plej agrablaj distroj kaj ekskurso en la Nigra Arbaro (Hochstrasse). La partoprenintoj en tiu neforgesinda studrondo esprimis unuanime la deziron ke oni daŭre organizu tiajn instruigajn eventojn.

R. Z.

La Beneluksa Esperanto-Kongreso En Utrecht dum Pentekosto 1955a

Tiun ĉi fojon la L.K.K. intencas ion rakonti pri la loĝado. La hoteloj en nia urbo disponas proksimume pri 500 litoj. Nu, ni supozas, ke tio sufiĉas por niaj kongresanoj, sed dum la Pentekosto en la pasinta jaro oni bezonis ĉiujn tiujn litojn kaj krom tio ne ĉiuj vojaĝantoj, kiuj intencis tranokti en Utrecht, trovis tie tranoktejon. Multaj el ili trovis ĝin 20 ĝis 40 kilometrojn ekster nia urbo.

Rilate al la dormĉambroj en pensioj kaj ĉe privatuloj ni povas diri, ke la situacio estas iom pli bona. Tamen ni konsilas: mendu sufiĉe frue vian liton.

Hoteloj en la proksimo de niaj kongresejo kaj festsalono estas:

Smits (9,—/120), Noord-Brabant (7,50/100) kaj Riche (6,75/90) sur la Vredenburg; Terminus (9,—/120), Du Commerce (6,75/90), Kagenaar (6,75/90) kaj Thalia (5,25/70) sur la Stacia placo; je malgranda distanco de tiu loko Domhotel (8,25/110).

Inter krampoj estas la prezoj de la plej malkaraj ĉambroj kun matenmango kaj servmono en guldenoj kaj en belgaj frankoj. Tiuj prezoj estas la novaj.

Kiu mendos ĉambron antaŭ la komenco de marto certe havos ion laŭ sia gusto. Pri mendoj post la unua de majo la L.K.K. ne povos preni ian respondecon. Ĝi tamen penos helpi la malfruigintojn.

Dum la lasta kunveno de la L.K.K. ni aŭdis ke la belgoj generale mendas ĉambron unu aŭ du semajnojn antaŭ la kongreso. Tial ni petas al vi: deviu de via kutimo kaj mendu ĉi tiun fojon tre frue. Kiam ni ne povos kontentigi vin, vi grumblos kaj ni ĉagreniĝos. Do helpu por ke ĉi tiu kongreso estu vera sukceso.

ATENTU BONE: La L.K.K. povos zorgi por dormoĉambro nur post via pago.

ALVOKO:

La L.K.K. en Utrecht serĉas gvidanton de la balo. Tiu, kiu povas kaj volas fari tion, sendu siajn kondiĉojn al la sekretario:

Fino A. J. M. Perk, Paulus Potterstraat 18, Utrecht.

UTRECHT

la urbo de la Beneluksa Esperanto-Kongreso en 1955a

El kiu ajn flanko oni proksimiĝas la urbon, jam de granda distanco oni vidas la katedralan turon, la „Dom”. Kune kun la pinto ĝi estas 112 metrojn alta. Oni komencis la konstruon en la 1321a jaro kaj finis ĝin en la jaro 1382a. Jam en la jaro 1254a oni ekkonstruis la preĝejon. Nur en la jaro 1517a ĝi estis preta. En tiu tempo

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ

RRREMION akiris post n-roj 181/182: F-ino M. R. Impanis el Bruselo, por V.E.B., kaj por L.E.E.N.: P. H. Mooij, Bruselo.

SOLVOJ

183. skalPo; paneLo; manIko; Bran-do; spiOno; deNtalo; mulAto; pAlato; tremPi; modUli; planDo; manEgo; moderNa; barAko; kanaJlo; staBlo; monAto; stRebi; popOlo; kOliko; cirkLo; Fringo; mastRo; koAkso; mediTo; kOlara; plaNko; kapOro; moruSo; ofeTi; pAlaco; tondRi; plumBo; sAtano; pastRo; sOpiri. Pli bona apude najbaro ol frato post arbaro.

184. Hor.: estra, klara, nit, egret, oponi, pafmortig; da, uj, korpulent, emi, arbar, pagil, ver, ren.

Vert.: genez, kav, pak, re, eterna, ombr, for, fantom, perl, orum, oktobr, lipo, tie, parodi, negr, gut, ie, talio, aln.

185. SANGENIGMO.

Trovu sesliterajn vortojn respondantaj al la donitaj klarigoj laŭ jena procedo: forigu unu literon el la unua vorto, aliordigu se necese la postrestantaj kaj aldonu novan literon por formi la duan vorton, k.t.p. Ĝis sub 20 vi retrovos la saman vorton kiel sub 1.

1. rabeti en kamparo; 2. lakso; 3. parto de vegetaĵo; 4. ŝirmarmilo; 5. arbo; 6. trofeo ĉe indianoj; 7. pinta trabo; 8. deziro; 9. ekleziulo; 10. lerta elpensi vortludojn; 11. lerta pro praktiko; 12. birdo; 13. kortbirdo; 14. ĝi kuŝas sur tablo post mango; 15. ŝirmilo ĉirkaŭ fajro; 16. moka rido; 17. arbo; 18. akrega tranĉilo; 19. batalilo.

(komenco paĝo 15)

la turo estis ligita kun la preĝejo.

Suprenirinte la 465 ŝtupojn, oni povas rigardi je distanco de 40 kilometroj. Se la aero estas sufiĉe seka oni eĉ povas vidi le turpinton de la katedralo en Haarlem. Unuflanke de la turo troviĝas la aŭlo de la universitato aliaflanke la akvo de la malnova kanalo. Iom malpli proksime oni vidas multajn preĝejojn, konstruaĵojn de la universitato, la grandajn administrajn konstruaĵojn de la nederlandaj fervojoj, la stacion, la elektrejon, la monfarejon, diversajn grandajn laborejojn, grandajn malsanulejojn, k.t.p.

Se la sanstato permesas al vi la supreniron ni povas rekomendi ĝin. La panoramo certe valoras la penon de la grimrado. Sed pripensu: kiam vi supreniros, vi ankaŭ devos malsupreniri, liftoj tie ne ekzistas. Por tiuj, kiuj ne ŝatas grimpi, estas en nia urbo aliaj vidindaĵoj. Promenante oni povas rigardi la statuojn kaj tiam oni ankaŭ admiri la internon de diversaj

186. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. funkciigi(R); kapo-parto(R). 2. amase; simbolo de sukceso(R); estigi(R). 3. ordinara laŭregula stato; homo akceptinta doktrinon(R). 4. lanteksajo el kiu oni faras ekz. pluvmantelojn(R); 5. okulparto(R); kunigi per fadeno(R); 6. plej bona parto el aro(R); 7. povanta esti; 8. muzika blovinstrumento(R); fluecigi(R); 9. ĝi estas uzata por hejti loĝejon(R). 10. difinita grado en iu evoluado(R); malbona stato de la sang(R). 11. provizi per bataliloj(R); pafajo(R); eldangorigi(R). 12. komen-ci(R); malkomponiĝi.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

Vertikale: 1. foresti; antaŭa flanko (R). 2. metalo; furioze ekscitita(R) forte. 3. punfrapi per branĉeto; bero(R). 4. maskofesto(R). 5. bulforma objekto(R); ordone altrudi(R). 6. nukso(R). 7. bezonanta ripozon. 8. barilo el stangoj(R); insektomanganta mambesteto(R). 9. aparato kiu registras la parolojn kaj kapablas poste reprodukti ilin laŭbezzone, tiel ebligante ilian transskribon(R). 10. larĝa strato(R); malliberigi(R). 11. filinido(R); merita la respekton(R); vasta etendaĵo da akvo(R). 12. hepata malsano(R); flosi laŭ la puŝo de la fluo.

La solvojn sendu la nederlandanoj al s-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstraat 21 hs., Amsterdam-Z.; la membroj de F.I.L.E. aŭ de R.B.L.E. al s-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 20/II/1955.

Por sia vintra provizo
Por sia antracita karbo
la Esperantistoj mendas
ĉe **BELGOMINE**
FRANKRIJKLEI, 20
ANTVERPEN
kiu donas specialan premion

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPEN

— Por via MUZIKO,
RADIO kaj GRAMOFONO

BRUGGE

BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaj prezoj

Moderna komforto

Sidejo de Bruga Grupo Esperantista
Tel. 314.59

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel. : 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

Verantw. uitgever: Reĝa Beiga Ligo Esperantista, De Bruynlaan 44, Wilrijk. Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.)

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.